

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 1 2014

Ĵaŭdon la 16an de januaro

62a jaro

Kalendaro

Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a**.

La **unuano mardon** kaj la **triano lundon** de la monato (kiel ĝis 2008).

Lundon la 20an de januaro (sem. 4) – *mandag*

Kiuj trajtoj de Esperanto estas facilaj kompare kun naciaj lingvoj kaj kiuj estas same malfacilaj? Vidu p. 3.

Hvilke trekk i esperanto er lette sammenliknet med nasjonalspråk og hvilke er like vanskelige? Se s. 3.

MARDON la 4an de februaro (sem. 6) – *TIRSDag*

Kiel eblas aŭskulti radion en Esperanto per interreto? Ni esploras kelkajn retejojn kaj gustumos programojn. Ankaŭ filmetojn. Vd. p. 2.

Hvordan høre på radioprogrammer på esperanto over internett? Vi ser på noen nettstedet og smaker på sendinger. Også noen kortfilmer. Se s. 2.

Lundon la 17an de februaro (sem. 8) – *mandag*

Testamento. Al kiuj organizoj kaj bonaj celoj testamenti sian havaĵon (krom al parencoj k.s.)? – aŭ al kiuj sendi donacojn? Se al Esperantaj celoj, al kiuj? Vd. p.3.

Testament: Hvilke organisasjoner eller gode formål er det best å testamentere formuen sin til (foruten til slektninger o.l.) – eller å sende gaver til? Hvis Esperantoformål, hvilke? Se s. 3.

Mardon la 4an de marto (sem. 10) – *tirsdag*

JARKUNVENO. Vidu p. 3.

ÅRSMØTE. Se s. 3.

Lundon la 17an de marto (sem. 12) – *mandag*

Pro kio oni lernu Esperanton nun en la mondo de 2014? Kion diri al la publiko? Vidu p. 4.

Hvorfor skal man lære seg esperanto, slik verden nå er blitt i 2014? Hva skal vi si til folk? Se s. 4.

OKAZIS

Lundon la 4an de novembro

Duan fojon ni aranĝis specialan kunvenon por novuloj, kaj venis du. Ni spektis la filmon el la jubilea jaro 1987, kaj kelkajn novajn filmetojn, i.a. argentinajn invitojn al la UK kaj la IJK, kaj Mazi-kurson.

Lundon la 18. de novembro

Thomas Jouanne kunportis sian gitaron kaj ludis kaj kantis por ni. Komune ni serĉis Esperantajn vortojn por la partoj de la gitaro kaj aliajn muzikterminojn.

Mardon la 3. de decembro

Leif Arne Storset rikoltis multajn bonajn konsilojn pri instruado de ĉeestaj kursoj en altkvalita seminario de Katalin Kováts – la majstro de la priinstruada retejo edukado.net. Tio okazis paralele kun la granda itala landa kongreso, kio ebligis al li interparoli kun pluraj korifeoj de la internacia E-movado. Ni ankaŭ iom diskutis pri la rolo de ĉeestaj kursoj en la nova interreta mondo.

Lundon la 16an de decembro

Ni voĉlegis raporton pri la Zamenhofaj tagoj en Bydgoszcz kaj Toruń, kiun ni ricevis retroŝte, kaj Cato Haugen suplementis: i.a. pri interparolo kun la prezidanto de la E-asocio de Taĝikio kaj pri la pola verkisto Julian Tuwim. Cato povos magistriĝi ĉe AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) per disertacio, kiun li pretigu ĝis aprilo, pri la Nobel pacpremio. Li ankaŭ estos ŝoforo por planata skandinava busveturo de Esperantotur Oslo – Pollando – Norda Kabo – Oslo – en junio/julio – kaj respondecos kiel loka ĉiĉerono dum halto en Oslo.

Lundon la 6an de januaro 2014

Ĉiu el la ĉeestantoj prezentis iun Esperantan libron. Ni aŭdis i.a. pri dulingva poemaro de Julian Tuwim, fabelo "por infanoj kaj aliaj homoj" de Johan Galtung, lingvoludaj poemoj de Raymond Schwartz, matematika vortaro seslingva kaj matematikaj amuzaĵoj.

Aŭskulti radion interrete

La radiostacioj kiuj sendis programojn en Esperanto unu post la alia ĉesis sendi. Sed ni ne ploru. Per komputilo, aŭ eĉ poŝtelefono, eblas aŭskulti ĉiutage retradion – ne je specifaj horoj sed kiam ajn laŭkonvene. Kaj la kvalito estas multe pli bona ol per la malnovaj kurtondoj. Ĉe iuj ankaŭ eblas vidi la tekstojn ekrane dum oni aŭskultas. **En nia kunveno mardon la 4an de februaro (semajno 6)** ni esploros kelkajn interretejojn kaj gustumos la sendojn. Ankaŭ filmetoj en Esperanto troveblas en la reto.

Jarkunveno / Årsmøte, mardon / tirsdag 4. marto

Tagordo / Dagsorden

- | | |
|--|---|
| 1. Aprobo de la kunvoko | 1. Godkjennelse av innkallingen. |
| 2. Elekto de prezidanto de la kunveno kaj de protokolanto. | 2. Valg av møteleder og referent. |
| 3. Jarraporto (Ni antaŭsendos ĝin retroŝte, kaj paperpoŝte al tiuj kiuj petos ĝin.) | 3. Årsrapport (sendes ut med e-post. Papirutgaven sendes til de medlemmene som ber om den). |
| 4. Jarkalkulo (same) | 4. Årsregnskap (sendes på samme måte) |
| 5. Ricevitaj proponoj (limdato ...). | 5. Innkomne forslag (frist ...). |
| 6. Elekto de estraro, revizoro kaj reprezentanto en la domkomisiono, ĉiuj kun anstatuanto(j). Ankaŭ de elekta komisiono. | 6. Valg av styre, revisor og representant i huskomiteen – alle med vara – samt valgkomité. |
-

Facilaĵoj kaj malfacilaĵoj de Esperanto.

Kiuj estas la plej konvinkaj facilaĵoj de Esperanto, kompare kun naciaj lingvoj? Kiuj estas la malfacilaĵoj, kaj ĉu ili estas same ĝenaj kiel en aliaj lingvoj?

Tion ni kune esploros en nia kunveno lundon la 20an de januaro (semajno 4).

Al kiuj testamenti aŭ donaci?

Ni preskaŭ ĉiuj ĉi-lande riĉiĝis lastatempe, kaj ĝuas la eblon mone subteni malplibonhavulojn, aŭ organizojn kiuj faras tion – per donacoj aŭ testamento.

Sed kiujn favori? Ni havas la kvar grandajn helporganizojn, multajn malpli grandajn, diversajn religiajn, sportajn, kulturajn agadojn kaj organizojn por sano, por paco, aŭ por la medio – kaj por Esperanto. Kiuj el ili plej indas subtenon, kaj kiuj aparte bezonas tion ĉar ili ne ricevas de la ŝtato aŭ de aliaj donacantoj? Kaj kiam temas pri Esperanto, kiuj plej bezonas kaj efike utiligas donacojn: NEL? UEA? ESF? La E-domo en Lesjöfors? Aŭ nia propra klubo? Tiujn demandojn ni provos prilumi en nia kunveno lundon la 17an de februaro (semajno 8).

Kial lerni Esperanton?

La mondo ŝanĝiĝas. Homoj en nordokcidenta Eŭropo relative bone lernis la anglan, kaj emas ĝin praktiki. Kial ili do lernu Esperanton? Kiugrade ĝi estas utila? Kiumaniere ĝi estas facila? Ĉu gravas ke ĝi estas nediskriminacia? Kiel Esperanto diferencas de naciaj lingvoj? Ĉu Esperanto estas lingvo por ĉiuj? En nia kunveno la 17an de marto (semajno 12) ni diskutos ĉi tiajn demandojn.

Nia membro May Helen Findahl* loĝas en **Eidsvoll**, je 10-minuta piediro de la fervoja stacio. Ŝi ŝatus ekzerciĝi pri Esperanto kun aliaj membroj, sed neniu loĝas proksime. Se vi preterpasos, ŝi bonvenigos viziton. *<findahlmayhelen87[a]gmail.com>

Info-budoj en foiroj?

Bonan okazon renkonti la publikon kaj informi pri Esperanto donas informbudoj en foiroj, konferencoj kaj festivaloj, sed ili ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en loka biblioteko. Se vi vidas / aŭdos pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmulte-koste), bv. sciigi tion al ni.

Viktig: *Si fra om du vet om en messe eller en konferanse hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling.*

T-ĉemizoj po 100 kr

Verdaj, kun blanka teksto *Vi snakker esperanto. Gjør du?* .

Blankaj, kun verda/bruna teksto *Esperanto er kult.*

Blankaj, kun verda/bruna teksto *Esperanto la internacia lingvo*

Glumarkoj: ruĝaj (4 x 7 cm), por valizo, (dorso)sako, teko ... po 2 kr.

Stokoj de ĉi ĉiom en la klubejo; ankaŭ vortaroj, gramatikoj, literaturo.

Kompletan liston de vendotaj libroj k.s. vi trovos interrete ĉe esperanto.no → **LIGILOJ** (supre) → **Literaturo** ... → **librolisto**.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94

Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo al Sinsen.

* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: oficejo*esperanto.no

Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al *NEL/Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper